

STAFETO




Eld. J. Régulo Pérez
KATALOGO N-ro 1 - AŪTUNO 1957

FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
CIERRE ESPERANTO-FEDERACIÓN

R-6702

16x2000

BABILO
PRI
STAFETO



KIEL naskiĝis STAFETO? Estus bele diri, ke ni konstatis la mankon, post la morto de Literatura Mondo, de Esperanta Eldonejo sisteme okupanta sin pri nia beletro, kaj ke ni decidis transpreni la rolon. Tio estus romantika penso; sed efektive nia entrepreno ĝermis, ne el celkonscia decido, sed pliĝuste el zigzaga hazardo! Ni nome en 1950 interesiĝis — post diversflanke spertiga eldono de ampleksa trivoluma hispanlingva *Historio de Kanariaj Insuloj* — pri alia granda hispana manuskripto, *Nobelaro de Kanarioj*, kaj ni ekhavis ideon starigi modestan presejon por ĝin eldoni. Akirinte la aparaton kaj la prestipojn, ni poste ekpensis, ke ni povus, kun malmulte da ekstra peno, eldoni ankaŭ ion en esperanto. Post pripenso, ni emis komenci per *Sekretaj Sonetoj* de PETER PENETER, grava poezia verko de 1932, kiu rapide elĉerpiĝis pro tro malgranda eldonnombro kaj de tiam tre mankis al studentoj de nia poezio. Ni ĝin elektis ankaŭ, ĉar tiu verko prezentus ne tro ampleksan libron, kaj tio konvenus al niaj modestaj rimedoj. Paŝante el nia izola ŝirmejo, ni ekserĉis per anonceto en gazeto ekzempleron de la libro, kaj tuj ĉirkaŭblovis nin la ventoj de la realo. Vere, ke la verkon ni trovis, kaj efektive ni neniam rezignis nian unuan inklinon ĝin represi — sed ni trovis ankaŭ, ke ĉie kuŝas bonegaj manuskriptoj, flaviĝantaj sur bretoj, ŝimantaj en tirkestoj. La vakuo post Literatura Mondo lasis tiun senpovan akumulon. Ni decidis nin streĉi por la pli granda bezono kaj — la vakuo ensuĉis nin.

Kvankam ni agis iom sub puŝo de eksteraj fortoj, ni ankaŭ havis, sciu tamen, kelkan direkton kaj konvinkigon. Ni estis nome

konvinkitaj, ke pli ol ĉio nia literaturo garantias la lingvon kontraŭ pereco. Ni konsciiis, ke verkoj neeldonitaj sufokas la verkiston kaj ke eldono stimulas plu ties talenton. Ni konstatis, ke al la postmilita generacio de esperantistoj mankas la antaŭmilitaj verkoj de Kalocsay, Baghy, Schwartz kaj aliaj, kaj ke tio faras en nia literatura evoluo doloran breĉon, kiu ĝenas la elkreskon de junaj talentoj. Ni do konsciiis la egan bezonon represii la klasikajn verkojn longe nehavoblajn. Vel tiun necesan parton de nia servo ni ĝis nun apenaŭ povis priatenti.

Nu, ni komencis per du poeziaj verkoj:

1952. *Kvaropo*. Poemoj originalaj de WILLIAM AULD, JOHN S. DINWOODIE, JOHN FRANCIS, RETO ROSSETTI.

1953. *La bapto de caro Vladimir*. Versa satiro de KAREL HAVLIČEK BOROVSÝ en traduko de TOMÁŠ PUMPR.

Sagacaj, longspertaj eldonistoj avertis nin, ke ni invitas bankroton. Poezio ne vendiĝas, ili kriis, kaj atentigis nin pri gravaj poemaroj —pli etaj kaj modestprezaj, ol niaj— de Hohlov, Miĥalski, Schwartz, kiuj ankoraŭ post 20 jaroj ne elĉerpiĝis. Ni ne povis refuti ilin per argumentoj, sed baldaŭ la vivo mem venis kun refuto: *Kvaropo* tute elvendiĝis en 18 monatoj, *La bapto de caro Vladimir* en 3 jaroj. Dume ni observis, ke la cele populara legaĵo, eldonata de niaj singardaj kolegoj, debitiĝas tre malrapide. Ŝajnas, ke fido povas foje pli valori, ol antikva sperto!

La prudento tamen sufloris, ke ni donu vicon al la prozo, kaj frue en 1955 aperis, preskaŭ samtempe, du novelaroj: *El la maniko* de RETO ROSSETTI, kaj *Koko krias jam!* de FERENC SZILÁGYI. En la sama jaro eliris ankaŭ la poemaro *Kontralte* de MARJORIE BOUTON, nova potenca stelo de nia poezio.

En junio, 1956, ni lanĉis novan en nia literaturo ĝenron per *Eseoj I* de GASTON WARINGHIEN, kaj la postan monaton jam dense sekvis la poemego de WILLIAM AULD *La infana raso*.

En 1957 ni plenumis nian delongan revon doni presformon al la epokfaranta *La floroj de l' malbono* de BAUDELAIRE en redakto de K. KALOCSAY kaj G. WARINGHIEN. Tiu duobla volumo prezentas por la unua fojo en nia historio la tutan poemaron de grava eŭropa poeto kaj, per sia provo starigi la definitivan ordon de la poemoj, faras gravan kontribuon al nacilingvaj literaturaj esploroj. Ni estas fieraj, ke ĉi tiu atuta verko aperis sub nia egido.

Nian unuan dekon beletran ni finis per ekskurso en ankoraŭ alian kampon, tiun de la originala versdramo, per *Jozefo* de JAKOB D. APPLEBAUM.

Apartan mencion ni ŝuldas al la artisto JOHN HARTLEY, kiu verkis por STAFETO vicon da estetike admirindaj kaj flekseble alkonvenaj kovrildesegnoj en du koloroj.

Kvin jaroj — dek libroj. Se ni rigardas la amason da beletraj verkoj, kiu kriptostulas presiĝon, ni ne povas esti tro memkontentaj pri tiu kvoto. Sed ankaŭ tro malkontentaj ni ne povas esti. La vojo ne estis glata, kaj ofte stumbligaj ŝtonoj, abruptaj baroj kaj eĉ samideana malzorgemo minacis nian stafetan vetkuranton. Ke ĝi ne tute falis, tion ni dankas iom al nia banala obstino, iom al la kunhelpado de kelkaj fideluloj kaj iom al la bona sorto, kiu fine venkis la barojn. Kaj nun ni povas ĝoji, ke ni staras jam sufiĉe fortike kaj povas iom trankvile kaj pozitive rigardi en la estontecon.

Ni ne estas tiel vantaj, ke ni volus pretendi, ke solaj ni portis la tutan ŝarĝon publikigadi nian beletron. Ni ĝojas konstati, ke ankaŭ multaj aliaj Esperantaj Eldonejoj laboris sur tiu kampo: Esperantoforlaget en Oslo (*Bagatelaro* de J. H. Rosbach); Eldona Rondo, Trondheim (*Peer Gynt*, Ibsen/Haugen); Eldona Societo Esperanto (*Sveda Poemaro* de Magda Carlsson, *La Normandaj Rakontoj* de Maupassant/Dupuis); Komuna Konversacia Klubo (*Rozoj kaj Urtikoj* de Thorsen, *Ezopa Saĝo* de Kalocsay, *Homoj kaj Riveroj* de Rosbach); Heroldo de Esperanto (*Kredu min, Sinjorino!* de C. Rossetti; *Tartarin de Taraskono* de Daudet/Delor-Le Brun); Kultura Kooperativo, Rio de Janeiro (*Ivan la Sesa* de G. Mattos);

Eldona Fakoj de UEA (*Vagado sub Palmoj* de J. Ribillard kaj nun *Angla Antologio*); Esperanto Publishing Co., Rickmansworth (*Fundamenta Krestomatio* de Zamenhof); Eldonejo Polonia, Varsovio (*Sinjoro Tadeo* de Mickiewicz/Grabowski; *Faraono* de Prus/Kabe; *Poeziaĵoj* de Julian Tuwim); S. A. T. (*Robaĵoj de Omar Kajam*, Waringhien), Amo-Akademio, Japanujo (*El Orienta Florbedo* de Kenji Ossaka) kaj aliaj enviciĝis en la beletran fronton. Al ĉiuj ni gratulas kaj deziras pluajn sukcesojn.

Ni longe revis ankaŭ elpaŝi kun aliaj serioj, inter ili unu popularscienca. Ni ĝojas anonci, ke debuto jam okazis per la originala verko de nia botanika fakulo D-ro PAUL NEERGAARD *La vivo de la plantoj*, kiun ĉie akompanas la delikataj desegnaĵoj de MADDS STAGE, eminenta dana libroilustristo.

Ke tiuj elirintaj verkoj estas nur malgranda ondo de la riĉa manuskriptaro je nia dispono, estas por ni gloro kaj ankaŭ doloro. Ankoraŭ malmulto estas farita pri represo de gravaj verkoj de longe elĉerpitaj. Al tiu devo ni nin turnos ĉe nia dua deko da libroj: antaŭ ĉio per antologio de nia originala poezio, 1887-1957 (redaktoro: W. AULD), verko, kiu parte transprenas la antaŭmilitan projekton de nia budapeŝtaj korifeoj: la trivoluman *Nova Krestomatio*. Al la sama ideo kontribuos ankaŭ kolekto de niaj plej bonaj originalaj noveloj (nun redaktata de ROSSETTI kaj SZILÁGYI).

Pluan perspektivon de nia eldonplano donas la jena listo de verkoj. Pro oportuneco ni prezentas la verkojn laŭ alfabeto ordo de la aŭtoroj:

JULIO BAGHY: *Sonĝe sub pomarbo* (versdramo).

ROGER BERNARD: *Topazo kaj S-ro Le Truhadek falas en di-boĉon* (komedioj de Pagnol kaj Romans, respektive).

MARJORIE BOULTON: *Eroj* (nova poemaro).

STELLAN ENGHOLM: *Homoj sur la tero* (dua eldono tralaborita).

JOHN FRANCIS: *La kaldrono* (romano).

- DOUGLAS B. GREGOR: *Reĝo Edipo kaj Antigona* (tragedioj de Sofoklo).
- GERALD C. JERVIS: *La mildigo de la megero* (komedio de Shakespeare).
- KÁLMAN KALOCSAY: *Poemoj de H. Heine.*—*Tutmonda sonoro* (duvoluma tradukantologio de la poeziaj ĉefverkoj en la tuta mondo).
- GERALDO MATTOS: *Arĉoj* (poemaro).
- PAUL NEERGAARD: *Esearo*.
- JEAN RIBILLARD: *Vivo kaj opinioj de Majstro M'saud*.
- RETO ROSSETTI: *Mestizo de la mondo kaj aliaj poemoj.*—*Otelo* (tragedio de Shakespeare).
- IVO ROTKVIĆ: *Ĉe l' rando de abismo* (diverstemaj eseoj).
- RAYMOND SCHWARTZ: *Akvo de l' rivero* (romano).
- ŠTEPÁN URBAN: *Nova Ezopo kaj aliaj satiroj*.
- ELI URBANOVÁ: *Nur tri koloroj* (poemaro).
- GASTON WARINGHIEN: *Eseoj II. Lingvo kaj vivo*.

Ni parolis pri la *dua deko* da verkoj, kaj jen staras jam 20 titoloj! Ni eĉ ĝojas pri tio. Paŝo post paŝo ni pluiros, ĉar kuraĝigas nin la indo de nia laboro, la subtenado de la esperantistoj, kaj ankaŭ la inspira ekzemplo de tiu brava entrepreno Literatura Mondo, de kiu ni transprenis la torĉon, kaj kiu, sub la genia gvidado de Vilmos Bleier, sukcesis eldoni 78 librojn.

Kun entuziasmo kaj solidara apogo ankaŭ ni povos multon atingi. Helpu al ni pluporti la torĉon!

LIBROLISTO

WILLIAM AULD, JOHN S. DINWOODIE, JOHN FRANCIS, RETO ROSSETTI: *KVAROPO* [Poemaro].— Antaŭparolo de GASTON WARINGHIEN.— La Laguna (Kanariaj Insuloj), J. Régulo — Eldonisto [Presita de Imprenta Gutenberg, Santa Cruz de La Palma], 1952.— 272 paĝoj; 4 aŭtorportretoj; kovrilo de la grafikisto JOHN HARTLEY.— 16 × 22,5 centimetroj; 435 gramoj.— STAFETO, Bel-literatura Eldon-serio, 1.— Prezo: 1.50 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro. [*Elĉerpita*].

Kvar novaj steloj «kvarope» ekbrilis ĉe la horizontoj de nia originala poezio. Harmonie sonas la versaĵoj de ĉiu el ili kaj *interharmonias* la stiloj, manieroj, temoj de la kvar. Sentoj diversaj vibras en la variaj artformoj: sensemo de Auld; animsoifa revado de Dinwoodie; versigita mondfilozofio de Francis; sentoplena, ofte sarkasma, ĉiam vivkomprenema emocio de Rossetti. Altkvalita stilo, riĉega vortaro, abunda kaj fekunda rimpotenco. Tiujn poetojn kreis Esperanto, ĉar nur dank' al Esperanto ili poetas; sed ne dezirante resti ŝuldantoj, ili repagis sian ŝuldon kun interezo kaj siaflanke kunhelpas al plukreado de nia lingvo.— L. LAURAT en «Sennaciulo».

Kion signifas tiu ĉi nova skolo? La kvar membroj reprezentas diversajn karakterojn, diversajn idealojn, diversajn temperamentojn kaj eĉ en ilia ideologio oni ne malfacile povas trovi diferencojn. Sed tio, kio kunligas ilin, estas la talento, la amo de la lingvo, la volo levi ĝin en la alton, ke la sube fluanta tempo ne difektu ĝin, la volo penetri en la profundon de la lingvo kaj de la sentoj; kaj krom tio ia komuna klopodo al la sincera «homismo», ismo, kiu ne estas registrebla inter la specifaj termoj de la esperantismo, sed kiu estas proksima al ĉiuj esperantismaj klopodoj de Zamenhof, Lanti, Hodler k. c.— F. SZILÁGYI en «Arbetar Esperantisten».

La apero de *Kvaropo* estas postmilita evento. Evidentiĝas ree, kvazaŭ per kalkulkontrolo, ke Esperanto estas plenmatura, tiel kiel ĝi nature, neniel kiel fremda lingvo, vige kaj nuance «vivas» en individua verko de kvar junaj diverstemperamentaj poetoj inde kompareblaj al multaj naciaj.— TYNEVERUM en «Nederlanda Esperantisto» kaj «Flandra Esperantisto».

KAREL HAVLÍČEK BOROVSKÝ: *LA BAPTO DE CARO VLADIMIR*. *Legendo el la rusa historio*. El la ĉeĥa esperantigis TOMÁŠ PUMPR [Originala titolo *Krest svatého Vladimira*].— La Laguna [Presita de Imprenta Gutenberg, Santa Cruz de La Palma], J. Régulo — Eldonisto, 1953.— 144 pĝ.; aŭtorportreto; 53 ilustraĵoj de la ĉeĥa Nacia Artisto JOSEF LADA; kovrilo de JOHN HARTLEY.— 16 × 22,5 cm.; 222 gr.— STAFETO, Bel-literatura Eldonserio, 2.— Prezo: 1,50 us. dol. aŭ egalvaloro. [*Elĉerpita*].

Havlíček uzis, kiel temon, historian okazaĵon — la decidon de la rusa caro Vladimir forlasi paganismon kaj, post konsidero de la diversaj religioj, elekti la grekortodoksan formon de kristanismo kiel regnan religion. Sed tiun temon, jam riĉan je burlesko, li uzis lertege por elpensi groteskajn situaciojn (ekz. la juĝado de Peruno, la pagana dio, antaŭ milittribunalo ktp), kaj precipe por doni esprimon al plej malrespektaj opinioj pri la registaroj, la pastroj kaj la policianoj, ĝenerale. Sub amuza kaj sprita formo, lia satiro iras malproksime kaj profunde — tiel profunde, ke eĉ politikistaj kapoj tion fojfoje ne atentis. Li faris sian verkon por la ĉeĥa popolo, kaj tial li uzis tute popularan lingvon kaj tre simplajn versojn — kaj la poemo rapide fariĝis trezoro de la parkera literaturo en lia lando. — Ankaŭ en la nia, sennacieca, ĝi indas fariĝi tia: ĉar malgraŭ la malfaciloj, kiujn kaŭzas la versa formo kaj krome la manko de popularaj dirmanieroj en nia lingvo, la traduko de D-ro Pumpr estas mirinde flua, belsona, samtempe facile komprenebla kaj plena je esprimovo, je elvokivaj rimoj kaj drastaj diroj. En multaj lokoj oni kredus, ke temas pri originalaĵo. — Populara psalmaro de liberpensado kaj kontraŭtiraneco, jen kio estas tiu altvalora poemo. — Ke tiu ĉi libro estas nun malpermesita en unu katolika diktatorejo kaj permesita en unu proletareca, tio aldonas nur kroman spicaĵon al la aventuroj de tiu testamento de heroo animo.— G. WARINGHIEN en «Sennaciulo».

Strofoj satiraj pri despotismo cara, en kiuj la tradukinto atingis mirindan sukceson je la trafa rimo kaj neta esprimformo. Ĉiu admiranto de la vortĵonglo kaj evoluigo de la latentaj uzebloj de Esperanto ne domaĝus la prezon de tiu majstra prezentado. Se leganto estas piemulo, li devus pardoni la ciniĉaĵojn, pro la superhoma manipulo de la lingvo kaj la malboneco de tio, kion la poemo tiel juste atakas.— F. R. BANHAM en «La Rondo».

RETO ROSSETTI: *EL LA MANIKO*. [Originala] Novelaro.— La Laguna, J. Régulo — Eldonisto, 1955. — 224 pĝ. — Kovrilo de RETO ROSSETTI kaj JOHN HARTLEY. — 16 × 22,5 cm.; 375 gr.— STAFETO, Bel-literatura Eldon-serio, 3.— Prezo: 1,80 us. dol. aŭ egalvaloro.

La belaspekta tria libro de la STAFETO-serio havas trafan titolon. Ĝi aludas kvazaŭ al la multbrila, sorĉista, multkolora kaj elegante facetita talento de Reto Rossetti, kies dekkvin prozaĵoj troviĝas en la libro. Tiuj ĉi prozaĵoj estas parte noveloj, parte homstudoj, parte humoriste prezentitaj eseoj aŭ detektivhistorioj, elskuitaj kun gracia lerto el la maniko de la aŭtoro. La verkista portreto de Rossetti kunmetiĝas el du elementoj: li estas bildartisto kaj de tie originas lia plastika prezentkapablo: liaj figuroj vivas en viva atmosfero — kaj li pasie, en maniero diferenca de preskaŭ ĉiu esp. verkisto, amas nian lingvon...

Se oni volus uzi la lingvon de la pentroarto, oni povus diri, ke Rossetti laboras per akvarela tekniko kaj per ties viglaj kaj serenaj koloroj. El tiu mondpercepto kaj el tiu akvarela pentromaniero preskaŭ tute mankas la profundaj ombroj. Escepto estas nur unu: la noveleto *Krutajo*, same trafa, kiel la aliaj; ĝin ni volonte mencias por citi belan kaj por la arto de Rossetti karakterizan frazon ĉe la fino de la noveleto: «Subite mi sentis, ke mia bela poŝpleno da vortoj traglitas inter miaj fingroj kiel sablo».

La medio de la noveloj kaj studoj estas multspeca, sed ĉiam kun klara kaj rapide rivela forto. Plej hejme Rossetti estas en la rondo de junaj artistoj; inter tiuj ludiĝas unu el la plej bonaj noveloj: *Francisko, la fuŝulo*, rakonto pri fuŝulo, kiu trovas sian naturan evoluon per la establo de petolajbutiko: «loko, kie ĉio misfunkcias intence». La plej virtuoza novelo, *Banu vin, mia bela*, ludiĝas en la mondo de Eroso; Rossetti ne estas farizeulo. La du detektivnoveloj de la volumo estas lerte verkitaj kaj ĉefe kun senpoza humoro. La homstudoj, kiel ekz. *Vilaĝa artisto*, restas vive en la memoro, ĉar mortaj punktoj de la enuo ne ekzistas en ili. La lingva ŝerco *La neologismologio* kaj la facila eseo *Esperanta vortludo* aldonas ŝajne «ion tute alian» al la libro, sed ververe ili apartenas solide al tiu ĉi interesa libro, kies esenca trajto i. a. estas la eksperimentado kaj lingva esploro.— F. SZILÁGYI en «Norda Prismo».

FERENC SZILÁGYI: *KOKO KRIAS JAM!* *Originala Novellaro.*— La Laguna, J. Régulo — Eldonisto, 1955.— 232 paĝoj; aŭtorportreto; kovrilo de JOHN HARTLEY.— 16 × 22,5 cm.; 325 gramoj.— STAFETO, Bel-literatura Eldon-serio, 4.— Kontrolita de la LITERATURA KOMITATO DE S. A. T.— Prezo: 1,80 us. dol. aŭ egalvaloro.

Ne estas necese serĉi vortojn de laŭdo pri la lerta plumo de la fama kaj renoma aŭtoro, instruisto kaj redaktoro F. Szilágyi. Lia riĉa stilo fluas senpene kaj nature; lia lingvo kvazaŭ intence evitas eksperimentajn transkapiĝojn kaj kapricaĵojn kaj tenas sin fideinde sur la tereno de niaj klasikuloj... — La bildoj de la rakontado bunte alternas, ĉenante freŝe la intereson de la leganto.— TOMÁŠ PUMPR en «Boletín» de Hispana Esperanto-Federacio.

En lerta kunplekto ... per la magio de loga rakontado, li vibrigas ĝis ekstrema intenseco ĉiujn kordojn de tiu *spirita* harpo, kiun ĉiu homo — ĉe plej skeptika — portas kaj gardas en sia animo.— LUIS HERNÁNDEZ en la sama «Boletín» de HEF.

... La aŭtoro redonas la vivon precipe per agoj. La homojn li prezentas ne per portreto, sed ja per trafaj ekfotoj. La multaj situacioj kaj okazaĵoj estas viglaj kiel filmo... — Szilágyi havas naturan talenton por tia rakontado... — L. C. DEIJ en «Esperanto» de UĖA.

... La aŭtoro havas multajn kvalitojn. La ĉefaj estas: ekvilibro de spirito kaj natura saĝo. Lia observemo estas akra kvankam kompatema. La priskribitaj karakteroj estas ĉiam kredeblaj kaj la pejzaĝoj estas pentritaj laŭ tia vero kaj precizo, ke ili kvazaŭ aperas antaŭ la okuloj. — Ĉi tiuj noveloj memorigas, jen laŭteme jen laŭstile, la rakontojn de Maupassant. Ĉu estas eble pli bone laŭdi verkiston? — R. LÉGER en «Franca Esperantisto».

Ĉe Szilágyi ĉio estas perfekte balancita, la vorto, la ritmo, la penso... Siajn rolulojn Szilágyi ne ĉasas en la brila amfiteatro de la mondo, li kutime malkovras ilin en la krepuskaj, forgesitaj niĉoj — ie ĉe la vivmarĝeno. Intence, kvazaŭ filma aparato, li mallarĝigas sian pupilon por fikstrigardi nur tiun eron de ilia estaĵo, kiu estas aktuala por la zorgo elektita cirkonstanco. — IVO ROŤKVIČ en «La Nica Literatura Revuo».

MARJORIE BOULTON: *KONTRALTE* [Poemaro].— Antaŭparolo de WILLIAM AULD.— La Laguna, J. Régulo — Eldonisto, 1955.— 288 pĝ.; aŭtorinportreto; kovrilo de JOHN HARTLEY.— 16×22,5 cm.; 430 gr.— STAFETO, Bel-literatura Eldon-serio, 5. Prezo: 1,80 us. dol., aŭ egalv.

La gravita centro de la poemaro kuŝas miaopinie en tio, kion mi volus karakterizi kiel *kontrapunkton de la koro kaj cerbo*. La poeziaj ideoj vibras inter la polusoj de arda emocio kaj malvarma intelekto. Frosta duŝo de la racio kaj respektataj deco kaj tradicio ĉiam estingas la jam-jam eruptontan tension de la trobolantaj sensoj; kaj male: la roso de efektiva, profunda homa sento ne lasas sekigi la sobrajn rezonadojn de intelektulo.— T. PUMPR en «Esperanto» de UEA.

Mi nur povas modeste formeti mian recenzan fontoplumon antaŭ tiom profundsenta, lirika verko, kiu unualoke estas laŭtiĝo de virinaj sentoj kaj pensoj. La poetino, profesiulo en la poezia kaj literatura fakoj, plej supere mastras la esperantan poemadon. La versoj fluas glate, eĉ en la severa formo de la soneto. La pensoj, ĉu logikaj aŭ aŭdacaj, belege agordiĝas kun rimvortoj. Evidente tiuj sponte ekestis kaj neniam impresas artefaritaj aŭ kunmartelitaj.— G. F. MAKKINK en «Scienca Revuo».

... Marjorie Boulton lokas sin senpere en la unua vicon de l'esperantistaj poetoj. Tia abundo da pensoj kaj bildoj, tia esprimriĉo, tia facileco de versfarado — se iu ankoraŭ dubus pri la taŭgeco de Esperanto por la poezio, la libro de Marjorie Boulton devus lin konvinki.— TEO JUNG en «Heroldo».

Kontralte estas trezorejeto de vera kaj plensanga arto... Jam post la unuaj poemoj ni rimarkas, ke al ni parolas poetino de alta klero kaj forta esprimpovo. Multifaceta estas ŝia personeco kaj multifaceta ŝia arto kapabla vin ravi... La lingvo de Marjorie Boulton estas esprimriĉa, freŝa, kaj inventema.— JIRÍ KORÍNEK en «The British Esperantist».

Ĉar ŝiaj poemoj estas nek ligitaj al tempo nek al spaco: en horizontala senco tuthomaj ili estas, sen limigoj geografiaj nek klasaj, kaj en vertikala senco iliaj profunde homaj sentoj disŝutas la barojn inter hieraŭ kaj morgaŭo, kaj igas la poemaron eterna bukedo... Hodiaŭ ŝi estas la unua poetino de la esperanta popolo.— T. S. en «La Progreso» (Beograd).

GASTON WARINGHIEN: *ESEOJ I. Beletro*.— La Laguna, J. Ré-
gulo — Eldonisto, 1956.— 246 paĝoj; aŭtorportreto; kovrilo
de JOHN HARTLEY.— 16 × 22,5 cm., 335 gr.—STAFETO, Bel-
literatura Eldon-serio, 6.— Prezo: 1,80 us. dol. aŭ egalv.

... Multflanka erudita poligloto, al kiu ne estas nekonata ĉiu iom grava verko de la mondliteraturo, kaj kiu tamen dediĉis sian koron, entuziasmon kaj firman kredon, sed ankaŭ siajn fortojn, al la afero de la lingvo internacia — jen la aŭtoro de *Eseoj*. Nek ordinara adepto de la lingvo, nek nekritika admiranto de ia ajn esperantlingva verkaĵo, sed profunda konanto de la lingva strukturo, ĝia vort-materialo kaj estetika uzeblo, kaj mem praktika multflanka aplikanto de la teoriaj tezoj — tia reaperas antaŭ niaj okuloj Gaston Waringhien en siaj *Eseoj*. Li estas dotita per admirinda kapablo arke observi la faktojn, ekzakte ilin taksu kaj klare esprimi la ideojn. Kaj ĉar lia stilo estas facilpluma, elasta, sprita, varianta laŭ la pritraktata temo, la legado fariĝas ĝua, eĉ streĉa aventuro. Unu grandan, neintencitan efikon havas la legado de *Eseoj*: oni legas pri konata literaturaĵo, kaj subite observas ĝin priradiata per ia flanko lumo, jetita sub nekutima angulo, kaj la verko ekvidiĝas denove tute freŝa kaj tiel alloga, ke oni ne povas kontraŭstari la tenton, sed elserĉas la libron por konatiĝi kun ĝi nun pli intime. Legi eseon pri literatura temo, verkitan de tiel kompetenta fakulo, estas kvazaŭ promeni tra supraĵe konata pejzaĝo sub gvido de sperta ĉiĉerono kaj surprizite malkovradi amason da novaj, nesupozitaj detaloj.— Ĉio alia estas tiu ĉi libro, ol unutona, enuiga legaĵo. La aŭtoro enkondukas nin en iun el siaj elektitaj terenoj, ekzemple sur la paĝojn de la Biblio aŭ de Hamleto... kaj ne lasas nin eĉ fariĝi sataj, kaj jen ŝanĝas la temon [. . .]. Kaj fine, en la tria parto de sia verko, Waringhien nin gvidas al temoj de kompara literaturo. Tie ni rekonas la kunaŭtoron de *Parnasa Gvidlibro*, la verkinton de pluraj traktaĵoj pri poetiko kaj faman tradukinton de elstaraj poeziaĵoj. Estas interese legi lian personan konfesion: «Mi amas la frazojn, kiuj havas ankoraŭ signifon, la versojn, kiuj havas ritmon, la rimojn, kiuj estas riĉaj, kaj la poemojn, kiuj estas fiksfarmaj. Kaj pri tiuj ĉi ekstravagancaj gustoj mi eĉ ne ruĝiĝas...» Tiu ĉi lia pasio ne nur riĉigas nian literaturon per tradukaĵoj de multaj eminentaj poemoj el plej diversaj tempoj kaj landoj sed ankaŭ inicas nin en la medion de la loko, kaj etoson de la epoko.— T. PUMPR en nepublikita recenzo.

WILLIAM AULD: *LA INFANA RASO*. *Poemo en 25 ĉapitroj*.— La Laguna, J. Régulo—Eldonisto, 1956.— 108 paĝoj.— Antaŭparolo de JOHN FRANCIS; kvin artaj ilustraĵoj de la pentristo PIERRE LAVALLE; kovrilo de la grafikisto JOHN HARTLEY.— 16×22,5 cm.; 210 gr.— STAFETO, Bel-literatura Eldon-serio, 7.— Prezo: 1,80 us. dol. aŭ egalv.

La liriko de Esperanto estas hodiaŭ tute sana. Ni povas fieri pri lirikistoj dediĉitaj kaj eĉ inspiritaj. Sed nura liriko ne produktas la majstro-poetojn. Por tio necesas konkero de la du pintoj de eposo kaj dramo. Tion konsciis la genio de nia Auld. Per sia kuraĝa kaj unika verko li levis la Esperantan vorton en alton ĝis nun neniam atingitan de iu Esperanta poeto. Fine kreigis la majstroverko, kiu montros al la mondo Esperanton kaj ties popolon.

La infana raso estas intelekta verko kun sentovibra subfluo. Kosmokonscia animo tie strebas analizi homvivan kaoson, prilumi obskurajn enigmojn per revelaciaj ekbriloj, pripalpante por firmaj bazoj. Tia pripalpo renversas ĉiajn homfaritajn idolojn kaj dogmojn, virgigas terenon por kultivo de l'aŭtora kredo pri pliperfektebla homaro.

Pli ol ĉion, Auld amas la homojn. Ĉu iam iu poeto tiel konscie kaj elvokive esprimis sian samsangecon kun la tuta homaro pasinta kaj estanta kiel la aŭtoro de *La infana raso*?

Mi dubas. Ĉar dum aliaj aferoj egalas, Esperantista poeto pli profunde sentas sian homaran apartenon. Vizia poeto kiel Auld penetras sian devenon ĝis «prapraa duiĝo de amebo», sian generon vidas nur kiel eron de ĉeno «kies finon ne formas ni nek vidos». Tio donas al lia verko gravegan valoron: tiun de ĉiupersona kunhomeco, kiu levas la poemon ĝis ekstrema elvokivo, ĉar ĉiu tie trovas komunajn esencojn de homa vivo kaj ties rilatoj al la universo.— BALDUR RAGNARSSON en «Esperanto» de UEA.

Ĉu Auld restos en nia poezio? Post tiu volumo mi ne hezitas jesi la demandon. Li ŝokas nun, li estas diskutata kaj atakata kiel neniu el niaj poetoj — sed ĉiam kiel kreinto de verko, kiu estas aŭ detruinda aŭ sekvenda aŭ apreze kontraŭenda — sed kiu ne estas preterpasebla.— M. ARCO en «The Worker Esperantist».

CHARLES BAUDELAIRE: *LA FLOROJ DE L' MALBONO*.— Kompleta eldono aranĝita laŭ nova ordo kaj sekvata de *LA DEFALAJŬOJ* kaj de *FRAGMENTOJ* rilataj al *La floroj de l' malbono*.— Esperantigis Roger Bernard, Magda Carlsson, Hilda Dresen, Kálman Kalocsay, Lajos Tárkony, Henri Vatré kaj Gaston Waringhien, kaj redaktis K. KALOCSAY rilate al la formo kaj G. WARINGHIEN rilate al la senca fideleco [Originalaj titoloj: *Les Fleurs du Mal* kaj *Les Épaves*].— La Laguna, J. Régulo — Eldonisto, 1957.— 400 pĝ.; du aŭtorportretoj; kovrilo de la grafikisto JOHN HARTLEY.— 16 × 22,5 cm.; 450/645 gr.— STAFETO, Bel-literatura Eldon-serio, 8-9.— Prezo: 2,40 us. dol. aŭ egalv.

Jen la plej valora verko de la esperanta traduka beletra de post la dua mondmilito.— Antaŭ ĉio temas pri verko de granda instiginto de la moderna liriko. Vivinte en la kondiĉoj de la juna kapitalismo en la dua triono de la 19-a jarcento, Charles Baudelaire estis la unua granda poeto, kiu trasantis la poeziecon de la grand-urbo, la antagonismon inter ĝia pomppalaca centro kaj ĝiaj ŝimaj suburboj en kiuj regas la monstra mizero kun siaj sennombraj idoj, la krimoj, malsanoj, prostituo, kripoleco kaj la mallumaj pasioj... Lia majstra priprento de plejaj naŭzajoj, elvokante ĉe la leganto plej altan estetikan plezuron brilekzemple evidentigis, ke la beleco de la poezia verko kuŝas ne en tio, kion ĝi prezentas, sed en tio, kiamaniere ĝi prezentas ion. Lian poezion distingigas, plue, eksterordinara poluriteco de la stilo kaj la koncizo, kiuj en la plej ebla grado koncentras en la versoj nur la puran poezion, forĵetante kiel balaston ĉion, kio makulus ĝian purecon. Pro ĉiuj ĉi kaj multaj aliaj siaj kvalitoj la verko de Baudelaire apertis novajn horizontojn kaj ĝermigis preskaŭ ĉiujn postajn grandajn tendencojn de la moderna poezio.— Traleginte antaŭ jaroj preskaŭ ĉiujn ĉi poemojn en la franca originalo kaj komparante nun la originalon kun la traduko, mi havis apartan plezuron admiri, kiel virtuoze la tradukintoj translingvis la sencon, la emocian tonon kaj la sonoron de la originalo.— Legante la tradukon oni ricevas impreson, ke ne plu ekzistas nacilingvaĵo, kiu ne povus esti adekvate reproduktata en Esperanto, ke post siaj kaskadoj en *Sinjoro Tadeo*, *Eterna bukedo*, *Infero* kaj *Cezaro* en *La floroj de l' malbono* la beletra Esperanto jam fluas kiel kvieta, potenca, ĉiujn obstaklojn venkinta rivero... — BOJĬDAR VANĈIK en «La Suda Stelo».

J. D. APPLEBAUM: *JOZEFO. Drama poemo en kvar aktoj kaj epilogo, bazita sur la biblia rakonto.*— Prezento de RETO ROSSETTI.— La Laguna, J. Régulo — Eldonisto, 1957.— 120 paĝoj; aŭtorportreto; kovrilo skizita de JOHN HARTLEY.— 16 × 22,5 cm.; 210 gr.— STAFETO, Bel-literatura Eldon-serio, 10.— Prezo: 1,00 us. dol. aŭ egalv.


Per *Jozefo*, la viva, multflanka talento de J. D. Applebaum vere trovas sian koncentron. La historio estas tiu klasika el la Malnova Testamento, kiu jam logis plurajn aŭtorojn, inkluzive la grandan Thomas Mann. Ĝi estas historio, kiun Applebaum, kiel mem Zamenhof, konas el la originalo. Ĝian spiriton li profunde sorbis jam en infanaĝo, kaj nun en plena matureco li marŝigas la rakonton per dramo samtempe majesta kaj homsimpla.—Anstataŭ la ŝablona romantismo, kiu kreas nur pufajn marionetojn, *Jozefo* prezentas al ni homojn, konsciajn ja pri sia kulturmedio, sed ankaŭ animitajn de personaj motivoj kaj pasioj. Al la majesta temo konvenas la plastika heksametra skemo, kies varioj proksimiĝas al la ritmoj de spontana parolo. Lingvaĵo klasike simpla portas la dramon, elaste kaj vivopulse, al la potenca klimakso.— Mi salutas ĉi tiun verkon kiel signifan kontribuon al nia originala dramo (ankoraŭ ne tre kvanta) kaj al nia dramopoezio. Mi deziras, ke ĝi sorĉu, kiel min, multajn legantoj kaj eĉ la teatran publikon, ĉar jen estas, ne ia kabineta legaĵo, sed dramo, kiu nur sur scenejo trovas sian plenan dimension.— RETO ROSSETTI en sia prezento de la libro.

Jakob David Applebaum naskiĝis la 14-an de novembro, 1877, en urbeto Mszczonów apud Varvovio. Kiel knabo li vizitis la hebrean lernejon, kie li studis la sanktajn librojn: *Biblion*, *Talmudon* ktp. Li eklernis legi la rusan kaj polan lingvojn laŭ la sanktaj libroj.— Li legis multe en la lingvoj juda kaj antikve-hebrea, kaj en polaj kaj rusaj libroj literaturaj. En 1900 li elmigris al Anglujo, kie li ankoraŭ loĝas. Eperanton li eklernis en 1909.— En 1921 li tradukis la infanlibron *Struvelpetro* de Hoffman kaj poste la klasikon de vojaĝista blago *Vojaĝoj kaj mirigaj aventuroj de Barono Munchhausen*. Ankaŭ li kontribuis al «Heroldo de Esperanto» kaj al «Literatura Mondo»; por ĉi tiu lasta li plenumis multajn gravajn tradukojn el la lingvoj hebrea kaj angla. Nun, por krono de lia longa, kreativa kariero, aperas lia tria libro, *Jozefo*, dramo originala kaj versforma.— *El la faldoklapa informo de la Eldonejo.*

PAUL NEERGAARD: *LA VIVO DE LA PLANTOJ* kun preskaŭ 100 desegnaĵoj de MADDS STAGE.—La Laguna, Kanariaj Insuloj [Presita de Modersmaalet, Haderslev, Danlando], J. Régulo — Eldonisto, 1957.— 128 pĝ.— 16 × 24 cm.; 310 gr.— STAFETO, Popular-sciencia Eldon-serio, 1.— Prezo: 2 us. dol., 12 danaj kronoj aŭ egalv.

Kiam la usona verkistino Rachel Carson verkis siajn librojn pri la maro, pri la ritmo de la besta vivo en la oceanoj kaj ĉe la grandaj marbordoj, pri la senĉese miriadanta abundo de forto kaj aspektoj de la marbestoj, tiam unuigis scienca klareco kaj poezia pureco en antaŭe nesuperitaj bildoj. De post ŝiaj libroj, kiuj apenaŭ forviŝiĝas el la memoro, oni ne vidis similan kunfandiĝon de naturdotita stilo kaj naturdotita observado — ne antaŭ ol nun ĉe Paul Neergaard.—En *La vivo de la plantoj* ni denove renkontas la saman talenton por percepti kaj la saman senson por la okupanta naturritmo, la travivanta miradon kaj ĝian senperan transformiĝon en artisme agordita sentimento...—Nekomparebla estas lia interpretado de la genia konstruiĝo de la tritika tigo, klarigita kaj vidita per levo de ŝalmo en giganta formato sur la urbodoma placo — en komparo kun la konstruaĵo de la urbodoma turo... — Kaj tiam li prenas sian filineton ĉe la mano kaj iras al la grandaj lapaj folioj. Ĉiu folio, kiun ili prenas, estas nova pejzaĝo, inter kies vojreto ili trovas milionope la etajn laborejojn de la folikarno, la ĉelojn, kiuj estas ĉiuj tute diferencaj, kun perfekta variado tute ĝis la molekuloj de la substancoj. Aliaj verkistoj ja antaŭe ekhavis la ideon preni sian knabineon ĉe la mano por iri en la naturon, sed imagu povi tion fari, kiel Neergaard faras tion.— Redaktoro NIELS BLÆDEL en «Politiken».

D-ro agron. Paul Neergaard estas distingita konanto de sia lingvo kaj homo kun neŝanceliĝa sento pri la maniero, en kiu eĉ la plej malfacilaj temoj devas esti pritraktataj, por ke ĉiu sen antaŭscioj povu kompreni ilin... — Li estas delikata stilisto, kiu neniam misuzas siajn rimedojn de efiko. Plej bela el liaj efikoj estas lia sincera amo al ĉio vivanta, lia profunda respekto al la laborejo de la naturo.—Kelkaj ĉapitroj en la libro legiĝas kun sama streĉo kiel la grandaj sensacioj, kaj tute simple, ĉar ili malkovras tute sensaciajn faktojn, kiuj superas multajn el tiuj, kiuj alie perdigas al ni la spiron... — Verkisto kaj kritikisto OLE VINDING en «Berlingske Tidende».





STAFETO

Eld. J. Régulo Pérez
APARTADO 25
LA LAGUNA, Tenerife
Kanariaj Insuloj